

HEROLDO

Eldono: Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-West.
Redakcio-Administracio: T. Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.
Abonotizoj por la sekvanta periodo (januaro-septembro 1947 = 9 monatoj):
Belgujo 100 fl., Nederlando 5.50 gld., cetero 2.50 dol. aŭ 10 angl. ŝil.
Anoncoj: 20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj b. flk. 20.—, gld. 1.— ktp.

DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 10 (1059)

FONDITA EN 1920 — 22-a JARKOLEKTO

15 Decembro 1946



Kio estis iam la domo de l'majstro...

Zamenhofa Strato n-ro 9 en Varsovio: la domo, kie loĝis kaj laboris nia majstro, kie en 1931 dum Internacia Postkongreso estis enmurigita marmora memortabulo. Nun nur ruinoj kaj ruboj. Kaj simile krias ruinoj kaj ruboj sian akuzon tra la tuta urbo. Akuzon mutan kaj tamen elokventan. Teruran akuzon kontraŭ barbareco kaj milito.

En la Zamenhofa festa tago — la majstro ja naskiĝis hodiaŭ antaŭ 87 jaroj — ni prefere publikigus pli ĝojigan bildon. Sed la vundoj de la lasta hombestiĝo estas ankoraŭ tro freŝaj. Ni ankoraŭ ne kapablas sincere ĝoji, vid-al-vide kun la ruinoj, la freŝaj tomboj kaj la milionoj da viktimoj inter la samrasanoj de l' majstro kaj la cetera homaro.

Polaj samideanoj plantis sur la ruinojn de Zamenhofa 9 la verdan standardon. Simbolon de espero kaj fido je pli bona estonteco. Simbolon de amo kaj paco, kaj de pli harmonia homaro. Kaj signon de la firma volo batali kaj bataladi tiel longe kaj tiel insiste kaj persiste, ĝis la bela revo de la majstro, kies loĝejon kaj laborejon ĉirkaŭis iam ĉi tiuj ŝtonoj nun rubiĝintaj, kaj la bela sonĝo de l' homaro « por eterna ben' efektiviĝos ».

VERDSTELAJ RADIOJ.

— Interkonsento estas farita inter IEL kaj UL (Universala Ligo), laŭ kiu ambaŭ lojale kunlaboros kaj reciproke sin helpados en okazoj de tiurilate invito aŭ peto, kondiĉe ke tiuj rilatoj ne malhelpu la politikan kaj religian neŭtralecon de IEL.

— Argentinaĵ gesamideanoj preparas la 4-an Argentinan Esperanto-Kongreson, kiu okazos je pasko 1947 en Buenos Aires. En Bahía Blanca fondiĝis societo « Nova Lumo ». Ankaŭ en Goya (Corrientes) fondiĝis grupo sub nomo « Esperanto-Centro de Goya » kaj komenciĝis kurso. Du kursoj okazas en Rosario. Ekzistas ankaŭ Asocio Esperantista Katolika Argentina, fondita en 1943, kiu aranĝis nunjare 6 kursojn por komencantoj, unu por progresintoj kaj unu por poŝtano.

— La eldonejo Literatura Mondo estas restarigita sub la gvidado de Bela Bleier fratino de la mortinta Vilmos Bleier. Oni projektas reeldoni la konatan revuon « Literatura Mondo ». Ankaŭ granda parto de la librostoko de L. M. estas savita, kaj la libroj denove estas haveblaj post nelonge. (Adreso: Röck Szilárd u. 28, Budapeŝto VIII, Hungarujo.)

— En Belgujo formiĝis novaj Esperanto-grupoj en Namur kaj Nivelles.

— En Gdansk (antaŭe Danzig) fondiĝis folio de Asocio de Esperantistoj en Pollando; en Gdynia oni komencis instruadon de Esperanto kiel deviga lernobjekto en Liceo de Belaj Artoj.

— Forpasis la jenaj gesamideanoj anglaj: S-ino A. E. Stacy-Good, s-roj G. F. Beacham Hall, Frank Parkin kaj Herbert Reed; nederlandaj: F-ino J. E. Rikkers en Hago kaj D-ro Wachter en Rotterdam; sveda: Per Lavén en Orebro. La laste nomita estis fervora leganto de Heroldo; li eklernis Esperanton je la aĝo de 64 jaroj kaj li preskaŭ atingis 81 jarojn.

Unua presaĵo el Japanujo post la milito.

Pere de Usono, atingis nin kelkaj numeroj postmilitaj de « La Revuo Oriento », kun tre interesa por ni enhavo. En unu el tiuj numeroj ni legas pri uzo de Esperanto ĉe la socialdemokrata partio. Ĉi tiu partio, en Japanujo nomita « Nippon Syakaito », metis paragrafon koncernantan al Esperanto en siajn t.n. « politikojn ». En la inaŭgura kunveno de la partio raportis ĝia centra-komitato s-ro Ono-Syuniti interalie, ke la partio uzos Esperanton por kontakti kun la popoloj de la mondo.

En la sama numero ni legas ke la Instituto por Paco Porciama (establa tuj post la milito kun la celo esplori kaj studi rimedojn por la venigo de konstanta mondopaco) decidis sub la iniciato de sia prezidanto, markizo Tokugawa, uzi paralele Esperanton kaj la anglan lingvon por publikigi siajn raportojn eksterlanden. La Instituto organizis Esperanto-kurson por siaj membroj kaj oficistoj gvidatan de s-ro Ošima-Joŝio, sendita de Japana Esperanto-Instituto.

En alia numero troviĝas protokolo pri la 32-a Japana Esperanto-Kongreso. Ni konstataj ke kelkaj japanaj samideanoj, bone konataj eksterlande, transvivis la militon, inter ili s-roj Ossaka, ŝindo-Seitaro, Prof. Suzuki, Prof. Hasegawa, s-roj Mijake kaj Inoue. Oni sciigas ke alia konata samideano Ĉikao Fujisava kaj membroj de Esperanto Hokoku Domei « perfidis la Esperantan spiriton, kunlaborante kun la faŝista registaro de la kapitalistaro, burokrataro kaj militistaro »; sed levigis voĉoj ke oni ne bezonas severe persekuti ilin.

La estraro de Japana Kemia Societo (Nippon Kagaku-Kai) decidis akcepti por sia organo ankaŭ disertaciojn skribitajn en Esperanto. Esperantlingvaj raportojn verkis Prof. F. Egami, biokemiisto de Nagoya Imperia Universitato kaj s-ro Y. Oota, biologo de la sama Universitato.

Esperanto kaj UNESCO

Dum kelkaj monatoj la provizora sidejo de la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de la Unuigitaj Nacioj troviĝis en Londono. (En la cetero de ĉi tiu raporto ni uzos la nomon UNESCO, la oficiale akceptitan mallongigon laŭ la komencliteroj de la angla nomo de tiu organizaĵo.) En majo 1946 la Internacia Esperanto-Ligo starigis kontakton kun tiu organizaĵo pere de la Brita Esperantista Asocio. Multe da informaj materialoj estis prezentata, kaj okazis intervjuo.

En la fino de septembro UNESCO translokiĝis al sia konstanta sidejo en Parizo. Post perkoresponda prezento de novaj faktoj, s-ro E.D. Durrant vizitis Parizon nome de IEL kaj estis akceptata ĉe UNESCO de D-ro Awad, estro de la Fakoj pri Sociaj Sciencoj, kiam pli da faktoj estis prezentataj kaj diversaj flankoj de la Esperanta movado estis diskutataj. La sekvanta estas traduko de la teksto anglalingve interkonsentita la 24-an de oktobro, kiel deklaro pri la fakta sinteno de UNESCO rilate al la internacia helpingva demando kaj la Esperanto-movado:

Estas komprenite, ke estas en la intereso de UNESCO fari pristudon pri ĉiuj klopodoj, kiuj celas al la enkonduko de internacia helpingvo.

Ĉi-tiurilate UNESCO prezentas en la nuna tempo, kaj verŝajne prezentos dum kelka tempo, neŭtralan sintenon koncerne ĉi tiujn klopodojn.

La Internacia Esperanto-Ligo, nome de siaj kunlaborantaj organizaĵoj ĉiuspecaj, estas informinta UNESCO'n pri la internacia petskribo por Esperanto, kaj tion faros en tuta ran informaron. Ĝi daŭre kunlaboros laŭ sia povo por helpi al UNESCO havigi al si ĉiajn informojn rilate al Esperanta, kaj tion faros en tuta kunlaboro kun ĉiuj Esperantaj organizaĵoj, pro kiuj ĝi havas rajton paroli.

Ĉi tio neniel malhelpos al kiu ajn Esperanta organizaĵo, kiu mem preferas prezenti rilatajn faktojn en sia propra nomo, sendepende de la kialoj, kiuj eble decidigos ĝin tiel agi.

UNESCO estos regule informata interalie pri la progreso de la petskribo ĝis ĝia fina prezento en komune taŭga momento. Intertempe, ĉi tiu novaĵo estu instigo al ĉiuj esperantistoj, eĉ pli intensigi siajn klopodojn kolekti subskribojn. Estas aparte dezirinde, ke oni ricevu la apogon de eksteraj organizaĵoj per alprenado de rezolucioj laŭ la teksto de la petskribo aŭ en simila senco. Se oni sukcesos en tio, oni estas petataj urĝe sendi plenan raporton kun ĝustita traduko de la rezolucio, se ties teksto ne estas la sama kiel en la petskribo.

Oni sendu la informojn rekte al s-ro E. D. Durrant, 18 Romeyn Road, London S. W. 16, Anglujo, kiu respondecas pri la kolektado de informaro laŭ interkonsentita sistemo por posta prezento al UNESCO.

C. C. GOLDSMITH,
Sekretario de IEL.

Post longa dormo

Revekiĝis nia afero en Rumanujo. Ĝenerala kaj laborista Esperantistaro en unu organizo.

Rumana Esperanto-Societo rekomencis sian propagandan kaj organizan laboron sub la prezido de s-ano advokato Vasile Timis. La gvidantoj de la laborista esperantistaro akceptis komitatajn lokojn, realigante la unuecon de la rumana Esperanto-movado.

En Bukureŝto.

Ekde la vintro 1945/46 funkciis en Bukureŝto kursoj bone vizitataj en la liceo Gheorghe Lazar, en la palaco de Laborĉambro kaj alie. La finanĉministro, per ordono n-ro 409.952 de 29 sept. 1945, konsentis senimpostan reklamadon de la lingvo Esperanto; la eduka ministro responde al petskribo de D-ro Mocsi, per ordono n-ro 140.141 de 4 majo 1946, aprobis principe la organizaĵon de libervolaj kursoj en la hungaraj mezlernejoj la estraro de l' sindikatoj rekomendis al siaj organizoj la lernigon de nia lingvo.

En la provinco.

En la provinco plej vigla laboro ŝajnas esti en Arad, kie s-ano Vincze sukcesis organizi kursojn en liceo ĉe la sindikatoj, la soc.-demokrata partio kaj la komerca ĉambro, kun bona helpo de la direktoro de l' industria liceo, s-ano ing. Carpinisau, profesoroj Halle, Botez kaj malnova UEA-delegito Wohlberg. Ĉe la Sindikato de Privataj Oficistoj (str. Horea 2) formiĝis esperantista sekcio, kunveno merkrede 18.00-19.30.

En la du-universitata ĉefurbo de Transilvanio, Cluj (pr. Kluj, malnova hungara nomo Kolozsvár), s-ano Mocsi sukcesis kolekti en sekcio de RES 50 malnovajn esperantistojn. En loka soc.-dem. gazeto « Erdély » li jam de julio ĉiudimane publikigas tutkolan rubrikon « Esperanto-Movado », vekante intereson de l' intelektularo. Precipe imponis la ĉapitroj pri nia literaturo (Antologio, Eterna Bukedo, Enciklopedio ktp.). Por decembro li preparis kursojn ĉe la partioj, sindikatoj kaj por universitataj.

En Braŝov bone laboras kol. D-ro Franz Josif sukcesinte finigi 40-anan kurson kun helpo de s-anoj Bukur kaj Schinagel; poste ili organizis perfektigan kurson.

Propagandas kaj instruas ankoraŭ s-anoj ĉefkuracisto D-ro Pop en Braila, Bordas en Salonta, Prof. Bojaki en Reŝita, D-ro Rotariu en Caramŝeŝ kaj instruisto Toth en Sardu-Nirajului.

Zamenhof kaj Esperanto-stratoj.

Plej energia estas en Oradea s-ano D. Vanea, la vicurbestro. Li jam organizis kursojn en la urbestrejo, alian por oficistoj kaj profesoroj. Rezulte de lia agado oni nomis straton je «L.L. Zamenhof» kaj alian je «Esperanto». Forta RES-sekcio funkcias.

Survoje al Balkana Federacio.

La nova RES organizis dum aŭgusto nunjara komunan vojaĝon al Balkana Konferenco en Aŝenovgrad (Bulgarujo), kie oni decidis konstantan kunlaboradon, starigis Balkanan Kontaktan Komitaton kun la fina celo: fondo de Balkana Esperantista Federacio. Plena teksto de la decidoj aperis en n-ro 9-10 de «Internacia Kulturo».

Dubo pri sinteno de Sovetio.

La tutkoran helpon de la partio ĝenas la dubo pri la Sovet-estrara sinteno al Esperanto. Tial la problemoj de la revivigo de nia movado interesas algrade ĉiujn sovet-influatajn landojn. Mi proponas ke la nova estraro de la Esperanto-movado adresu pere de Heroldo malfermitan leteron al k-do ministrestro Stalin en la senco de l' artikolo pri marksismo en la Enciklopedio, laŭ la UNO-principoj kaj tute malkonsiderante la «feran kurtenon». Mi skribis en mia loka artikolaro pri «Marksismo kaj Esperanto»: La marksista idearo rilate al Esperanto similas al mesio-atendo de l' judoj. Post alveno de Jesuo, Kristanismo estis akceptata nur post 300 jaroj. Ni esperu, ke en moderna mondo sufiĉos 100 jaroj. Ĉiukaze 60 jam pasis.

D-ro KAROLY MOCSI.

Al ĉiuj kristanaj legantoj ni deziras ĝojigan Kristfeston, kaj al ĉiuj legantoj senescepte

Feliĉan Novan Jaron 1947!

Hispanlingvaj propagandiloj por Brazilo — ĉu sukceso?

El nederlanda gazeto:
Propaganda folio de la registaro raportas ke, por akiri komercajn rilatojn en la eksterlando, iu ministerio eldonis du broŝurojn: unu pri niaj termostoj por kultivado, kaj alian pri niaj Tekselaj bredŝaŭpoj. Tiu pri la termostoj estas destinita por Brazilo, kaj tio ne estas malbona ideo. Sed nian estimon por tiom da aktiveco ni vidas baldaŭ moderigita, legante ke, «konsekvence», la broŝuro estas verkita en la hispana lingvo, kaj konsiderante ke en Brazilo la landa lingvo estas la portugala.

Efektive, se la tuta mondo enkondukus Esperanton, kiel duan lingvon por ĉiuj, oni «konsekvence» povus uzi Esperantlingvajn propagandilojn por hispankaj portugalingvaj landoj, kaj krome ankoraŭ por la tuta cetera mondo. Sed tiu konkludo ankoraŭ por la nederlanda gazeto estis tro, kion diri?, eble tro simpla, aŭ tro kuraja.

URTIKO.

Nia rilato al germanaj esperantistoj

Pri tiu ĉi temo ankoraŭ daŭre alvenas al nia redakcio voĉoj el diversaj landoj, kaj ili senescepte protestas kontraŭ la artikolo de la juda-pola esperantisto en n-ro 5. Ne estas mirige, nun kiam Heroldo povas atingi Aŭstrion, ke inter la novaj protestoj troviĝas precipe multaj el tiu lando (unu oficiala de Aŭstria Esperantista Federacio). Sed estas aliaj el Svislando, Finnlando, Britujo, Nederlando, Belgujo ktp. Speciale menciinda tiu de franca samideano, kiu estas prezidanto de la Societo de Eksternlandanoj en Sablé-sur-Sarthe. La loko ne permesas al ni publikigi ĉiujn protestojn (parton ni jam publikigis en n-ro 7); sed ni esperas, ke ni sukcesos publikigi almenaŭ iun aŭ alian el ili ankoraŭ en unu el la venontaj numeroj.

Ni estas petitaj, formuli ankoraŭ nian starpunkton en tiu ĉi afero. Ĝi estas tre simpla kaj klara: nia starpunkto estas la kristana kaj Zamenhofa. Ni sincere ĝojas ke responde al la artikolo en numero 5 ni ricevis ekskluzive nur protestojn kaj ne eĉ unu aprobon. Kion ajn estas klare kaj nedubeble, ke la lasta milito estis senkatenigita de unu terura homo kaj ke ĝi estis intence preparita de li kaj lia kunularo, kaj kiam ajn estas pruvite, ke germanoj faris ĉielenkriantajn krimojojn jam antaŭ la milito kaj eĉ pli dum ĝi, tamen ne povas esti vere ke, ekzemple, tiuj germanoj, kiuj mem estis kaptitaj kaj turmentitaj en la koncentroj, aŭ tiuj kiuj rifugiĝis pro la reĝimo, estas kunkulpaj. Aŭ, se tamen ekzistas ia kolektiva kulpo, ĝi povas esti nur tre laŭgrada kaj relativa, kaj tiukaze ĝi certe ankoraŭ ne estas nur-germana.

Cetere ni publikigis la artikolon de la juda-pola esperantisto ne sen averto al li. Jen kion skribis nia redaktoro al li i.a.:

«... Komprenoble, mi ne konsentas kun via malamega vidpunkto. Mi povas kompreni ĝin, pro la teruraj spertoj kiujn vi havis; sed... tia vidpunkto estas rekte kontraŭ la idealoj Zamenhofaj. Pro tio mi ankoraŭ preferas, publikigi vian artikolon sen via nomo; ĉar eble, iam estonte, vi mem bedaŭros ke vi skribis tian malamajon...»

Ĉu kunlabori kun la germanaj kaj germanaŭstraj esperantistoj? Tiu demando, laŭ mi, tute ne ekzistas. Ni povas rifuzi kunlaboradon kun iuj el ili, kiuj tro evidente perfidis la idealojn de l' Esperantismo... sed rifuzi kunlaboradon kun la ceteraj signifas, de nia flanko perfidi tiujn samajn idealojn.

Por konkludi, ni atentigu pri nur unu fakto, kiu ankoraŭ povas multon klarigi koncerne la okazintaĵojn en la pasinta tempo: pri la kunpremiteco de la germana popolo sur relative malgranda teritorio. Antaŭ la milito loĝis sur sovetia teritorio 9 homoj sur unu kvadrata kilometro (en ĝia eŭropa parto 22), sur usona teritorio 15, sur brit-imperia 18, sur franc-imperia 9, sed sur germana teritorio (antaŭ la anekso de Aŭstrio) 142. Tiam la tuta loĝantaro de Germanujo estis 67 milionoj; intertempe la proporcio fariĝis eĉ pli malfavora, ĉar nun 67-70 milionoj da germanoj devas loĝi sur teritorio eĉ pli limigita. Komento superflua. Oni povas esprimi la opinion ke tio estas la justa puno por la teruraj krimoj faritaj en la nomo de la germana popolo. Sed ĉu en ĝi ne embuskas nova danĝero? Eble nur la kreo de Mondfederacio de ĉiuj ŝtatoj en la mondo, kun mondĉivitaneco, mond-pasporto kaj libera moviĝado tra la kvin kontinentoj, ankoraŭ por la infanoj kaj nepoj de l' nunaj germanoj, povos konduki el tiu dilemo.

Bulgara Esperanto-Asocio ĝuas subvenciojn de la registaro.

Bulgara Esperanto-Asocio rapide kreskis post la milito: de 30 societoj en 1945 al 56 en la nuna jaro. En minimume 325 bulgaraj urboj kaj vilaĝoj loĝas esperantistoj, kies adresoj estas konataj. Pro neebleco, ricevi Esperanto-presaĵojn eĉ privataj presejoj, la bulgaraj esperantistoj starigis propran presejon, kie estas presataj la revuo «Internacia Kulturo» kaj diversaj libroj. La Informa Ministerio subvencias tiun ĉi revuon per 100.000 levoĵ, per senpaga papero por kvar numeroj kaj per pruntado de klišoj. Per sama sumo ĝi subvencias la nunjaran kongreson de BEA.

«Internacia Kulturo», kiu sin nomas «demokrata, progresema kaj antifaŝista», komencis novan jarkolekton. Oni promesas por la nova abonperiodo 16 numerojn, kaj la abonprezo estas 500 levoĵ, por Nederlando 6 guldenoj. Abonantoj de Heroldo povas aboni ĝin pagante 4.50 gld. per poŝtmandato al la administracio de Heroldo.

BERN 1947

Provizora Kongresprogramo

Vendredo, la 25-a de julio.
9.00 Malfermo de la kongres-oficejo en la ĉefa stacidomo (vizitebla ĝis 22.00).

Sabato, la 26-a de julio.
8.00 Kongres-oficejo en la ĉefa stacidomo vizitebla ĝis alveno de la lastaj trajnoj.
15.30 Kunsido de IEL kaj LKK en Hotelo Bristol.
20.15 Interkonatiĝa Vespero en Kurŝaal, se eble, en naciaj kostumoj.

Dimanĉo, la 27-a de julio.
9.00 Malfermo de la kongresa poŝtejo en Kazino.
10.00 Solena malfermo de la Kongreso en la Granda Salono de Kazino. Invititaj estos: la Svisa Registaro, la Registaro de Kantono Bern, la Konsilantaro de la komunumo Bern, la Civitana Konsilantaro en Bern, la diplomatoj kaj honoraj gastoj.
14.00 Solena Esperanto-diservo en Münsterpreĝejo.
20.00 Kunsido de la IEL-estraro.

Lando, la 28-a de julio.
9.00 Fakaj kunsidoj.
10.00 Unua laborokunsido de la Kongreso.
14.30 Fakaj kunsidoj.
15.00 Kunsido de la IEL-komitato.
20.30 Esperanto-teatraĵo en la Granda Salono de Alhambra.

Mardo, la 29-a de julio.
9.00 Fakaj kunsidoj.
10.00 Dua laborokunsido.
14.00 Fakaj kunsidoj.
15.00 Kunsido de la IEL-komitato.
20.30 Esperanto teatraĵo en Alhambra.

Merkredo, la 30-a de julio.
9.00 Fakaj kunsidoj.
10.00 Tria laborokunsido.
20.30 Prelegvespero de Esperanto-verkistoj.

Ĵaŭdo, la 31-a de julio.
9.00 Fakaj kunsidoj.
10.00 Kvara laborokunsido.
15.00 Kunsido de la IEL-komitato.
20.30 Kongresbalo en Kazino.

Vendredo, la 1-a de aŭgusto.
9.00 Fakaj kunsidoj.
20.30 Koncerto en Alhambra.

Sabato, la 2-a aŭgusto.
9.00 Solena fermo de la Kongreso.

Ĉiutage de dimanĉo ĝis vendredo: rondveturadoj tra Bern; de lundo ĝis sabato: tutaĵaj kaj posttagmezaĵaj ekskursoj, interalie al Jungfraujoch (merkrede, ĵaŭde kaj vendrede).

Por la postkongresa semajno estos aparta programo.

Diservoj. La programoj de la diservoj por la protestantoj, katolikoj kaj izraelidoj estos pli poste sciigataj.

Adreso: 32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947, Bundesgasse 20, Bern, Svislando.

Kvar mil hungaraj fervojistoj volas lerni Esperanton

Diskutoj pri Esperanto en la hungara Parlamento.

Paroladoj kaj kursoj tra la lando.

En la hungara Parlamento, deputito Stefano Csurgai, vicprezidanto de Hung. Esp.-Societo kaj fakdelegito de IEL, faris demandon, ĉu la ministro de instruado enkondukos la instruadon de Esperanto en kelkaj lernejoj. Li detale klarigis dum dudek minutoj al la parlamentanoj la utilon kaj disvastiĝon de Esperanto. En la sekvinta kunsido oni laŭleĝis la respondo de la ministro, laŭ kiu li nun ne bontrovas la instruadon de Esperanto, ĉar dum sesdek jaroj ĝi ne atingis, ke la gvidantoj personoj ĝin uzu, kaj — instruite pri Esperanto — la lernantoj, plenaĝiĝinte trovas ke ili lernis ion neutilan. Csurgai respondis al la ministro denove per detala parolado refutante la argumentojn kaj deklarante, ke li ne akceptas la respondo de la ministro. Dum diskutado multaj el la deputitoj esprimis la akcepton de la ideoj pri Esperanto, kaj granda parto — precipe la socialdemokrataj deputitoj — ne akceptis la respondo de la ministro. Estas menciinde, ke kelkajn semajnoj poste la ministro, komprenoble per aliaj kaŭzoj, abdikis. Intertempe ministeria ordono permesis la instruadon de Esperanto en unu instruista seminario, kie anoncis sin 30 lernantoj. Okazas kurso, pagata de la ŝtato, ankoraŭ en gimnazio, kiun kurson gvidas Prof. A. Pechan. En la Parlamento, Prof. L. Kökeny gvidas kurson por oficistoj. Ankoraŭ en la agrikultura ministerio okazas malgranda kurso.

S-ro Csurgai kiu partoprenis kun ŝtata subvencio la nederlandan Esperanto-kongreson, faris pri tio tre interesan paroladon en HES kunveno kaj poste parolis pri sia vojaĝo, ofte menciante ankoraŭ Esperanton, en la hungara radio. La radio ankoraŭ koniĝis informon, ke en urbo Szombathely komenciĝis vigla Esperanto-vivo. En urbo Budafok la grupo de la Sovet-Hungara Kultursocieto aranĝis pro klopodoj de faked. Kassai konvenon pri Esperanto, kie parolis s-anoj Baghy, Balkanyi, Bleier kaj Kökeny. Oni akceptis proponon uzi Esperanton, se estas ebleco, por fari kulturinterilatojn kun la popoloj en Ruslando. En Nyiregyhaza Prof. J. Kondor komencis kurson por gimnazianoj kaj skribis artikolojn pri Esperanto en gazeto.

Pro granda propagandolaboro de s-ano L. Korsos kaj pro morala helpo de la ŝtata fervojoj anoncis sin 4000 fervojistoj en la tuta lando por lerni Esperanton. Aliaj landoj imitu kaj kunlaboru!

En kadro de la Landaj Protestantaj Tagoj, okazintaj en Budapeŝto, estis oficiale anoncita en la programo sur la stratafiŝoj en gazetoj kaj invitiloj la kunveno de Kristana Esp.Ligo, kiu okazis la 31-an de oktobro en la studenta societo «Soli Deo Gloria». P. Balkanyi salutis en nomo de IEL kaj KELI. Li detale parolis pri la sola energio, kiu donis al Esperanto la mirindan vivoforton disvastiĝi tra la mondo. Tiu — ofte nomata «interna ideo» — estas la sama spirito kiu, eĉ se la plimulto de la esperantistaro ne konscias pri tio, laboras en Kristanismo, gvidante la homaron al interkomprenema, sinferema, por aliaj laboranta amo. Estas la misio de KELI, krom enkonduki la uzadon de Esperanto en ekleziajn movadojn, pliprofundiĝi tiun ĉi spiriton en la Esperanto-movado. L. Farkas detale koniĝis la evangeliaran rolon de Esperanto. Univ. Prof. D-ro Stefano Nyireő, kiu fariĝis nova gvidanto de la hungara KELI-movado, pritraktis la sekvotajn labormetodojn. La monata revuo «Reformatus Hiradó» aperigas sub regula rubriko la oficialajn sciigojn de KELI en hungara lingvo. La gazeton ricevas ĉiu kiu sendas jaran donacon de fr. 6.— por

hungara KELI-laboro, al: Budapest V, Pozsonyi-ut 58, Eklezio.

La konata preŝejo S. Szalay komencis la eldonadon de Esperanta leterkurso. Adreso: Budapest VIII, Esperanto-strato 39.

Dum kunsido de HES oni ĝoje akceptis la invitleteron de redaktisto de «Internacia Kulturo» (Bulgarujo), ke ankoraŭ hungaraj partoprenu en tiu ĉi bela revuo, kiun jam kune redaktas bulgaroj, jugoslavoj kaj rumanoj, por plivastigi la reciprokan kulturajn kaj socialajn interkomprenojn kaj krei amikan atmosferon ĉe popoloj de la Danubio. Oni petis J. Baghy por interilati kun «Int. Kulturo».

Esperanto kaj la geinstruistoj.

La tempo de la militaj jaroj alportis al ni esperantistoj ian ripozon sur la propaganda tereno. Tre nature estas ke ni verigardis kaj demandis al ni, ĉu ni estis sur la bona vojo, rilate al la propagando per nia Esperanto. Kaj la demando altrudis sin: Ĉu ni devas rekomenci la laboron post la milito laŭ la sama maniero?

Kiam ni superrigardas la teron kaj prezentas al ni kion ni atingis post pli ol 50 jaroj, dum kiuj Esperanto ekzistas, ni ne estu permisimaj. Multon ni atingis, kaj nia lingvo enpenetris ĉien. Sed se ni demandas: Ĉu ĝi enpenetris tiom, kion ĝi povis, ni hezitas jese respondi. Nia lingvo - tiel facila, kaj tiom taŭga por servi la tuthomaron, celanta tiajn altajn idealojn! Kaj nia voĉo sonas ankoraŭ ĉiam tre modeste. La idealismo de kelkmiloj da fervoraj esperantistoj tute ne kulpas pri tio, sed la fakto estas ke ni ankoraŭ ne atingis la grandan amason. Kion ni tamen atingis?

Per de la kursoj por plenkreskuloj la Esperanto-movado havigis al si kernon da idealistoj, kaj eble iom pli grandan kvanton da aprobantoj, kiuj iam havis kontakton kun Esperanto, eks-kursanoj kiuj nun pli-malpli estas indiferentaj rilate al Esperanto, sed kiuj verŝajne nun formas la latentan forton de nia movado. Tiun latentan forton ni devas mobilizi por nia estonta laboro. Nia propagando ĝis nun grandparte okazis pere de lingvokursoj. Ni tiel montris al la mondo, ke kaj kiel Esperanto taŭgas. Laŭ mi ni nun devas eniri la duan fazon de nia laboro: pli da atento por la praktikado de Esperanto kaj la propagando por ĝiaj utiloj, ebleco kaj neceseco. Ni povas kalkuli almenaŭ pri la morala subteno de la de mi nomita latentaj rezervoj. Komprenu min bone: mi ne volas diri ke ni de nun malatentu kursgvidadon, sed ke ni pli forte ol antaŭe provandunu la uzadon kaj la ideon inter la granda amaso.

En ĉi tiu fazo de nia propagando ni unuoloke klopodu atingi la lernejojn. Eksterlernejoj kursoj por infanoj estas bonaj el ĝenerala propaganda vidpunkto, sed tia stadio estu por ni nur provizora elirpunkto por pli radikala enpenetradon. La lernejoj mem ni devas atingi; sub la zorgoj de propraj instruistoj en kutima lerneja instrutempo la juna generacio devas lerni Esperanton. Eble tiu generacio pli poste solvos la lastan problemon en la tria fazo de nia movado: atingi la personojn, kiuj povas decidi pri ĝenerala internacia enkonduko kaj uzado. Tiuj aŭtoritatuloj verŝajne nur cedos kontraŭ la premo de la granda amaso. Per niaj kursoj al plenkreskuloj ni ne atingos laŭ sufiĉe vasta skalo en proksima tempo tiun amason, mi jam asertis. Plej efike estas Esperantigi la junularon kaj do ankoraŭfoje: la lernejojn.

La sekvanta demando, kiu sin altrudas al ni, estas: Kiel plej racie atingi la lernejojn?

Direkti celkonscie kaj daŭre la ĝeneralan propagandon fare de niaj landaj Esperanto-organizaĵo al ĉi tiu instituto pere de gazetaro, paroladoj kaj petskriboj, do: konkeri la publikan opinion; kaj ĉi tie nia latentaj rezervoj verŝajne ne ideble sed

Unu el multaj.

Kun granda bedaŭro ni legis, ke 14 tagojn antaŭ la liberigo de Aŭstrio mortis, pro la turmentoj suferitaj en la koncentroj Subben, la iama ĉefdelegito de IEL en Aŭstrio, s-ano Gustav Weber, 59-jara. Li estis ankoraŭ kunlaboranto en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, antaŭ ol ĝi estis fermata de la SS je la 21-a de marto 1938. — Sed kun vera ĝojo ni sciigis, ke nia samideano Nikolaus Hovorka, kiun la nazistoj jam frue tenis en koncentrejon, sukcesis saviĝi. Li nun estas ĝenerala sekretario, kaj membro en la komitato de la Aŭstria Societo de Amikoj de Esperanto.

tamen pli helpos, ol ni povas imagi. Kaj precipe: ne forgesu prilabori la instruistaron. Ĝis nun nur kelkcentoj da ili estas esperantistoj. Estas por ni ĉiuj evidente, kiam pli bone estas la situacio rilate al la lernejo, se ne kelkcentoj sed kelkmiloj da gekolegaj starus ĉe nia flanko. Propagando por nia afero inter la geinstruistoj do estas unuaranga kondiĉo sur ĉi tiu tereno.

Se la geinstruistaro demandas al ni: Kial Esperanto?, la respondo donos la ĝenerala propagando fare de niaj landaj organizaĵoj esperantistaj, en unua instanco.

Kaj: Kion ni povos atingi kun niaj lernantoj en la Esperanta instruado? Por konvinki ilin pri la atingeblaj rezultatoj, la eksterlernejaraj kursoj, kiujn mi proponis kiel antaŭŝtupojn, povos doni la respondojn.

Ĉu Esperanto kiel internacia lingvo povos servi niajn internaciajn fak-interesojn? Tiun demandon devos respondi la geinstruistoj esperantistaj mem. Por tio estas necesa sufiĉe altnivela fak-organo kiu tamen nur povos ekzisti pere de sufiĉe granda aro da gekolegaj-abonantoj. Sed antaŭe estos necesa la uzado de Esperanto kiel internacia lingvo de la diverslandaj fakorganizaĵoj. Ĉi tie ni rondiras en la fama malbona cirklo: Nur adeptojn ni povos altiri per la uzado de nia lingvo, kaj tiu uzon ni nur povos havigi al ni, se multaj gekolegaj tion deziras. Necesa estas kerno da gekolegaj, kiuj posedas sufiĉan idealismon por daŭrigi la laboron kaj por rompi la fatalan cirkulon. Felice tia kerno jam ekzistas, kvankam ĝi ankoraŭ ne estas sufiĉe fortika.

Laŭ mi, la instruistoj mem estas la plej necesaj personoj, kiuj antaŭ ĉio devas firme propagandi inter la kolegaro, la gepatroj de siaj lernantoj kaj eble la lernejaraj aŭtoritatuloj. Se ĉiuj konvinkitaj esperantistoj inter la geinstruistoj daŭre laŭ plej racia maniero propagandas en sia plej proksima ĉirkaŭaĵo, ni jam post nelonga tempo povos montri konsiderindajn rezultatojn. Evidentiĝos ke persona kontakto kaj persona influo sur ĉi tiu grava tereno povos efiki multon. Praktike mi vidas tiun laboron jene:

1. La instruisto unuoloke prilaboru sian propran lernejon: la kolegojn kaj la gepatrojn, ne per vortoj sed kiam eble plej multe per faroj kaj praktikado.

2. Li klopodu propagandi en fakkunveno kaj kuneseto de gepatroj.

3. Li komencu almenaŭ eksterlernejaran kurson por infanoj.

4. Tie, kie ekzistas loka grupo de esperantistoj, li en kunlaboro kun ĝi kaj kun neesperantistaj instancoj klopodu formi komitaton, kiu laboros por Esperanto al la ĝejunularo!

Mi opinias, ke tia laboro estas realigebla. Pli ol ĝis nun ni devas direkti nian propagandon al la geinstruistaro, kaj pro tio estas bone, same kiel pro la propagando pere de gekolegaj en la lerneja medio, ke jam kelkaj kolegoj formas apartan grupon, kiu en komuna laboro povos sin dediĉi al tiu speciala tasko sur tereno, kie ĝi povos influ kiel eble plej efike.

Tio estas mia unua motivo, kial mi preferas unuoloke de geinstruistoj aparte. Mia dua motivo estas pli faka:

Internacie la gekolegaj urĝe petas pri formado de landaj grupoj, kaj multaj eĉ pri tuja renovigo de la internacia kontakto pere de la organo aŭ organizo. Precipe Francujo kaj Anglujo nuntempe. En Francujo interalie ĉ. kvincent gekolegaj kunigis en aparta grupo kaj havis sian propran kongreson en Parizo. Ili laboras kune, precipe por atingi la lernejon kaj krome por kontentigi specialajn fakinteresojn. Kun la anglaj samprofesuloj ili havas firman kontakton kaj ili interkonsentis pri labormetodo kaj atingotaj celoj. Mi opinias ke tiu interkonsento povos formi bazon por aliaj landaj grupoj.

Pri tuja rekonstruo de internacia organizo, kia estis la antaŭmilita TAGE, nun ankoraŭ ne temas. Starigo de fortaj landaj grupoj estas la proksima celo. Ju pli rapide tiuj formiĝos, des pli baldaŭ ni ankoraŭ povos eldoni internacia fakorganon. Nur se tiu estos sur la nivelo, kie tia organo devas esti, ni povos uzi ĝiajn propagandistajn eblecojn por nia varbado inter la neesperantista kolegaro. Kaj tiam ĝi certe multe efikos.

Faru ni nian eblon. Se en ĉiu lando ĉiuj geinstruistoj, kiuj scipovas Esperanton, de nun kunlaborus laŭ de mi montrita skemo, ni farus tre rimarkindan paŝon antaŭen. Al vi, miaj gekolegaj, mi direktas nun mian alvokon: Alportu tujn vian kunlaboron kiel specialistoj sur ĉi tiu aparta tereno! Ĉia prokrasto signifos perdon por nia ĝenerala movado. Laŭ mia opinio la afero estas jena:

Se antaŭ la milito ĉiuj geinstruistoj, kiuj en la tuta mondo scipovis Esperanton, estus kunlaborintaj celkonscie laŭ ĉi-supra skemo, tiam ni estus atingintaj konsiderinde pli grandajn sukcesojn en nia agado por akiri la lernejojn. Almenaŭ ni zorgu nun ke ni atingu tion, kio estas atingebla. Esti esperantisto ne signifas bagatelaĵon; tio alportas al ni devon, kaj se ni vere ion sentas por la disvastigado de Esperanto, ni konsciu pri tiu devo kaj agu laŭ ĝi.

(Ĉi-supra artikolo estas verkita de s-ano P. KORTE, Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando, kiu estis administranto de la antaŭmilita TAGE.)

«Carmen finfine alvenis»

La vojo de libereca standardo.

Standardo de aŭstra libereca bataliono fariĝis litkovrilo kaj kuseno de infanlulilo, trapasis malliberejon kaj koncentrejon, migris tra pluraj landoj, kaj fine saviĝis al Vieno.

Aŭstra samideano, kunbatalinto en la aŭstra libereca bataliono de la Internacia Brigado, sendis al ni, sub la pseŭdonimo *Franoro*, la jenan interesan raporton pri la mirinda sorto kaj fina saviĝo de l' bataliona standardo:

Estis la tagoj de novembro 1936. Precize antaŭ dek jaroj. La urbo Madrido, pere de la urbestro, transdonis trikoloran standardon respublikan al la 11-a Internacia Brigado kaj ordonis, ke ĉi tiu standardo ĉiam transiru al tiu bataliono, kiu sin speciale distingis en la defendo de Madrido. Tiel migru la standardo de bataliono al bataliono kaj troviĝu ĉiufoje ĉe la plej kuraĝa. En la gravaj bataloj ĉe l' Ebro la aŭstra bataliono ricevis tiun standardon, kaj de tiam ĝi restadis la standardo de la aŭstroj.

Kiam la hispana respubliko estis venkita de faŝista armilsupereco, kiam germanaj kaj italaj aviadiloj kaj kanonoj detruis sur hispana tero la lastan reziston de la herooj hispanaj filoj, la aŭstraj volontuloj venis kun sia standardo al Franclando.

Zorge kudrita en mantelo, ĝi estis transportita de batalanto trans la hispan-francan limon. Sed poste la germanoj invadis Francandon. La standardon oni devis savi, kaj virino prenis sur sin tiun ĉi aferon. Kudrita inter du litkovriloj kaj kovrita per blua silko, la standardo transformiĝis en sendanĝeran litkovrilon. La ĝis en sendanĝeran litkovrilon. La intenco estis, lasi ĝin dum la danĝerintenco estis. Sed antaŭ ol oni ra tempo ĉe familio. Sed antaŭ ol oni ra trovis taŭgan lokon por ĝi, la kovrilo estis kelkajn tagojn en la loĝevrilo estis kelkajn tagojn en la loĝejo de la aŭstra samideano. Ĝuste en tiuj tagoj tiu kamarado estis arestata surstrate, kaj oni timis traserĉadon de la domo. La kovrilo estis en danĝero. La francaj aŭtoritatoj permesis al nia arestita samideano, kun polica akompano preni el sia loĝejo sapon, dentbroson kaj aliajn necesajn objektojn, kaj tiun okazon li uzis por kunveni ankaŭ la « sendanĝeran » kovrilon. Kaj tiel ĝi migris kun li al la malliberejo kaj poste al koncentrejo franca. Kun la tuta havaĵo ĝi estis konservata en la magazeno (deponejo) de la koncentrejo. Sed amikoj en la koncentrejo atentigis pri la danĝero, kiun signifas la kovrilo por ili ĉiuj.

Iutage kelkaj batalintoj estis transportataj al la milita tribunalo, kaj tiam hazarde la kovrilo pendis ĉe fenestro de la magazeno, kie la estrino pendigis ĝin por aerumado. Kaj nun

Unua heroo kaj libervola viktimo de la atom-epoko

Juna sciencisto enpaŝis trankvile la sferon de mortigaj radioj por malhelpi, per ofero de sia vivo, teruregan katastrofon.

La historio de la scienco estas plena de ekzemploj de plej granda sinofero, kaj precipe scienbranĉoj laborantaj kun materialoj danĝeraj liveras atestojn pri granda vico da viroj, kiuj konscie kaj malheziteme oferis al la progreso siajn vivojn. Plej juna tia branĉo estas la laboro kun la atom-energio.

En grandaj konstruaĵoj de Los Alamos en Usono oni senĉese laboras super novaj inventoj, kiuj ne nur signifos militarmilojn kaj minacon sed kiuj malfermos al la mondo ankaŭ novajn eblojn de kulturo kaj laboro. Nun malsekretigis «Science», la organo de usonaj sciencistoj, okazaĵon kiu traviviĝis, sen ke la mondo ĝis nun ion sciatis pri ĝi. Pro neatentemo de unu el la kunlaborantoj okazis, ke oni faris tiom danĝer-

oni provis denove savi la standardon kun helpo de amikoj ekstere de la koncentrejo. En frostega vintra nokto, kiam forta vento malebligis al la postenantoj bone vidi, kuraĝa kamarado rampis kun la kovrilo sub la brako tra la dratbarilo kaj grimpis de arbetaĵo al arbetaĵo supren al monteto. Pezaj lignaj ŝuoj preskaŭ malebligis iradon. Tial li sensuigis sin. Li atingis arbareton, kie lin atendis kamarado por akcepti la standardon, por kaŝi ĝin ĉe konsciaj vilaĝanoj. Kaj li sukcesis reatingi la koncentrejon nevidite. Du semajnon poste venis al la kamaradoj en la koncentrejo letero, en kiu estis skribita: « *Carmen finfine alvenis kaj iros al la procinco por bone ripozi* ». « Carmen », tio estis la standardo, kaj ĝi do venis en bonajn manojn.

Post la liberigo oni eksciis la pluan sorton de la standardo. Franca familio estis kusenminta per ĝi sian infanlulilon, kaj neniu povis suspekti ke la standardo troviĝas tie. Kiam Parizo estis liberigita, la standardo estis transportata tien kaj entuziasme salutata. Aŭstraj liberecobatalintoj ĉe francaj partizanoj kunprenis ĝin al Jugoslavio, kaj ĉe tiu vojo ĝi denove fariĝis kovrilo. La aŭstra Libereca Bataliono, kiu batalis kun la jugoslaviaj partizanoj de Tito kontraŭ la germanoj, fine kunportis ĝin al Vieno.

Ĉi tiu standardo do reprezentas historion de rezisto, kaj de neestingebla kredo al estonteco, al venko, — kredo kiu helpis trasavi la standardon de la urbo Madrido, tra malliberejo kaj koncentrejo, al jam libera Aŭstrio.

ran eraron en la procedo, ke ĝi povus estigi imageble plej grandan katastrofon : ĉenan reakcion. Per tio estas dirita nenio malpli grava ol rapidege sinsekvanta reakcio, kiu kaŭzas ne nur la intencitan reakcion kaj atom-diserigon en la difinita materio, sed de atomo al atomo pluan disfalton, kaj do ion tiom teruregan, kion ni povas observi en la universo, kie flagras tutaj malproksimegaj mondoj en kirlego de tiel liberiĝanta energio. Sciencistoj ne kuraĝas diri, kien ĝisirus tiu procedo, se ĝi ne estus lastmomente malebligita. Tamen ĝi estas okazintaĵo instruanta, kiom danĝeraj aferoj estas praktikataj.

Lastmomente oni konstatis la eraron, kaj nun restis nenio alia ol persona interago de kuraĝa viro, kiu haltigus la procedon — kaj oferus sin. Tiom ja al ĉiu evidentas, ke senpera tuŝiĝo kun radioj de tia energio signifas certan morton. Kun rideto kaj sen iu ajn pripensado antaŭpaŝis 40-jara *D-ro A. Slotin* kaj eniris en la sferon de la mortigaj radioj, kie li sian taskon plenumis. Elveninte, li foriris kun same trankvila rideto en hospitalon, kun plena konscio, ke estas lia lasta vojo. En la malsanulejo li partoprenis ĝis lasta momento pacience kaj kun plej granda scienca kaj nepersona intereso ĉiujn studojn pri la progresanta procedo de sia poŭma kaj terura mortado. Li helpadis al la kuracistoj, kiuj observe sekvis sur li ĉi tiun procedon de ĝia komenco ĝis la certa fino. Sciu, ke li estis la unua homo, ĉe kiu oni povis klinike observi ĉi tiun tutan procedon, kaj li do eĉ dum sia mortado faris al la scienco grandan servon.

En Japanujo, sur kiun estis ĵetitaj la atombomboj, ne eblis observi tian procedon sur homo, sed nur ĝiajn postsekvojn ĉe tiuj, kiuj transvivis la katastrofon kaj estis trovitaj post la kapitulaco. *D-ro Slotin* estis do vere la unua. Nun li estas malviva, kaj li mortis heroe dum plej grandaj doloroj, kiujn moderigis nur la scienca intereso, je kiu li ilin priskribis kaj diktis.

Cetere tiu unua heroo de la «atom-epoko», kiel ni nomas nian tempon, ne estas denaska amerikano. Li naskiĝis ankoraŭ en cara Rusujo ie en oriento, kie li spertis kontraŭjudan pogromon kun ĉiuj siaj teruroj. Batoj, murdado, brulanta hejmo, fuĝo. Poste li studis en fremdlando fizikon kaj kemion. Ĉe tio li estis ĉaspelata el lando al lando, kaj la jaro 1936 lin trovis en Hispanujo. Tiam ĵus ko-

Ismalia :

Laudo al Dio

(Parafrazo de « A Melodia Sublime », 32-a ĉapitro de « Os Mensageiros ».)

Plej Alta Sinjoro de ĉiuj vivmondoj, de ĉiuj estuloj plej bona Sinjoro, akceptu la dankon, sendatan sur l' ondoj vibrantaj de nia humila adoro. Akceptu la preĝon de Viaj gefiloj, ĝin portu al Vi de l' spirite' la flugiloj!

Ni petas bonvolu patrame nin beni, bonvolu firmigi en ni la esperon, la puran de l' Viv' Idealon subteni, ke l' bonon ni amu, la belon, la veron. Ni pensu dankeme pri Vi je l' mateno, ni pensu pri Vi ĉe la nokto-alveno.

Al Vi de la vivo ni dankas la ĝojon. Ho Patro plej sankta de l' Amo, nin guidu tra l' tento, kaj montru al ĉiuj la vojon; al via protekto ni ĉiam konfidu!

Ni estas ja Viaj kreitoj, ho Dio, radioj de Via saĝec' kaj racio.

Instruu nin, kiel malkovri ni povas la grandajn trezorojn ja, kiujn Vi gardas de l' Viv' en profundoj, por ni! Ilin trovas serĉant', se li firme antaŭen rigardas. Helpate de Vi, ekbruligu ni nian lanternon, por trovi la celon racian.

Sinjoro, ni paŝas kun Vi en l' Eterno; en Vi ni moviĝas; do nian laboron Vi benu, lumigu nin en la interno, ke Viajn komprenu ni Amon kaj Gloron! Brilegu en ĉiuj ni Via hellumo, fortigu nin ĝia ĉiela parfumo!

Emanu el Via benado, ho Dio, al niaj okuloj perfekta klareco, al niaj oreloj spirit-harmonio, al niaj piedoj kaj manoj vigleco. Kreitojn ja ĉiujn sur vo' evolua Vi guidas per Lumo de l' Amo konstrua.

En l' Amo Sublima de l' Ter' kaj Ĉielo, en vera beleco de ĉiuj vivantoj, en la progresado de l' aĵoj kaj steloj, de ĉiuj estuloj en voĉoj kaj kantoj Vi estu laŭdata, kun pia fervoro, de l' mondoj Sinjoro!

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ.

mencis Franco, kaj la juna *D-ro Slotin* batalis kontraŭ li kiel demokratia soldato ĉe la kontraŭaviada artillerio. Kiam eksplodis la mondmilito, li anoncis sin malgraŭ sia miopeco al la brita aviadistaro. Li volis fariĝi batal-aviadisto. Dume oni rimarkis liajn eminentajn sciencajn kvalitojn kaj sendis lin al Usono, kie li gajnis meritojn pro unuaj scienlaboroj, kiuj kondukis fine al malkovro de la mistero de l' atoma energio. Li fariĝis ĝia unua martiro, kaj la amerikaj sciencistoj, kiuj sur la ĉefa loko de sia gazeto dediĉis honorajn vortojn al lia ekzempla heroo ofero, povis fari jam nenion alian ol proponi *D-ro* *Slotin* por plej altaj honorigoj kaj ordenadoj postmortaj.

El « Narodni Obroda » trad. J. KORINEK.

LIA SINESTIMO KRESKIS.

Komercisto (al konato) : Hodiaŭ mi petis de inform-oficejo informon pri mi mem. Konato : Kun kia rezulto ? Komercisto : Mia estimo por mi kreskis je cent procentoj.

Tabelo de Heroldo-kotizoj 1947.

La abonkotizoj por Heroldo estas egalaj al la MA-kotizoj de IEL. La abonperiodo daŭras de januaro ĝis fino de septembro 1947. Ni akceptas abonojn nur por la tuta periodo 9-monata.

Lando	Abonanto	Sub-tenanta Abonanto	Heroldo-Patrono	Anonceto (po 20 vortoj)	Valuto	Oni pagu la kotizon al
Argentino	8	20	80	1.50	pesoj	E. Iglesias Nunez, Dehesa 1860, Buenos Aires
Aŭstralio	10	20	100	2.—	angl. ŝil.	L.E. Pfahl, 64 Brighton Street, Croydon, N.S.W.
Aŭstrio	20	40	200	4.—	aŭ. ŝil.	« Tramondo », Neutorgasse 9, Wien I
Belgujo	100	200	1000	20.—	belg. fk.	Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-W. aŭ : Belga Esp.-Instituto, Antwerpen
Brazilo	40	100	400	8.—	kruz.	Brazila Ligo Esp., Praça de Republica 54, Rio de Janeiro
Britujo	10	20	100	2.—	ŝilingoj	Brita Esperantista Asocio, London W. 11
Ĉeĥoslovakio	100	200	1000	20.—	ĉs. kronoj	Esp.-Asocio en Ĉsl. Respubliko, Praha 47
Danujo	10	25	100	2.—	dan. kr.	L. Jakobsen, C. Etlarsvej 14, Aabyhøj (pĉk. 541.33)
Egiptujo	10	20	100	2.—	angl. ŝil.	Tadros Megalli, P.B. 450 Cairo
Finnlando	275	600	2750	50.—	f. mk.	J. Vilkki, Somero (pĉk 60253)
Franco	240	500	2400	50.—	fr. fk.	J. Guillaume, Esp.-Oficejo, 34 rue de Chabrol, Paris 10
Germanujo	20	40	200	4.—	g. mk.	S-ino S. Jung, Hauptstr. 9, Horrem Bez. Köln
Hispanujo	22	45	220	5.—	pes.	F. Rivelles Giménez, Plaza de Tetuán 40, Castellón de la Plana
Hungarujo	24	48	240	5.—	for.	P. Balkanyi, Kreditbank, Budapest 507
Irlando	10	25	100	2.—	ŝil.	L. O'Uiginn, Sonas, Cnoc na hInneona, Dundroma-Dublin
Islando	10	20	100	2.—	angl. ŝil.	O.S. Magnusson, Bergstadastraeti 30 B, Reykjavik
Italujo	450	900	4500	75.—	liroj	L. Minnaia, Viale Giulio Cesare 223, Roma
Jugoslavio	100	200	1000	20.—	dinaroj	Ernest Kasović, Gradska ŝtedionica, Zagreb
Maroko	240	500	2400	50.—	fr. fk.	S-ino I. Fink, 3 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca
Nederlando	5.50	11	55	1.—	guld.	Teo Jung, Scheveningen (postmandate)
Norvegujo	10	25	100	2.—	n. kronoj	Norsk Esperanto-Forbund, Boks 942, Oslo
Nov-Zelando	10	20	100	2.—	angl. ŝil.	V.J. Leck, 189 Vivian Street, Wellington C. 2
Palestino	500	1000	5000	100.—	mil.	P. Lachowitzky, Kerem Quar, Jerusalema
Polujo	250	400	2500	50.—	zl.	R. Sakowicz, Asnyka 4, Warszawa-Okecie
Portugalujo	50	100	500	10.—	esk.	J. de Saldanha Carreira, Av. Grao Vasco 33 r/c., Benfica-Lisboa
Svedujo	9	18	90	2.—	sved. kr.	Förlagsföreningen Esperanto, Boks 19071, Stockholm 19
Svislando	10	20	100	2.—	sv. fk.	Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn
Urugvajo	4	9	40	1.—	pesoj	P. Casas, Mercedes 927, Montevideo
Usono	2.50	5	25	0.50	dolaroj	D.E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37.
Aliaj landoj	10	20	100	2.—	angl. ŝil.	Heroldo de Esperanto, Scheveningen, aŭ: Int. Esp.-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

Ĉiu senescepte skribu al ni : Reabonantoj kaj ne-reabonantoj.

La poŝtaj rilatoj ankoraŭ ne estas idealaj. Ni eksciis, ekzemple, ke multaj usonaj abonantoj ne ricevis la numerojn 3 kaj 5. Sed preskaŭ neniu el ili skribis al ni por peti postliveradon.

Nun alproksimiĝas la nova jaro. Kun ĝi komenciĝos la nova abonperiodo. Numero da abonantoj, precipe nederlandanoj, jam reabonis. Sed la sciigo pri la reabono de multaj el la ceteraj landoj atingos nin nur post semajnoj aŭ monatoj. *Por eviti interrompon en la liverado de Heroldo*, bonvolu tial ĉi, kiu intencas reaboni (eĉ se oni ne povas tuj pagi), tuj sendi al ni simplan poŝtkarton nur kun sia nomo kaj adreso (sen alia sciigo por ke oni povu afranki ĝin per la plej malalta afranko, nome tiu de presajo). La samon faru ĉi, kiu jam repagis sian kotizon al abonperanto; ĉar povas okazi, ke la informo de la abonperanto atingos nin nur post semajnoj aŭ monatoj.

Ankaŭ tiujn, kiuj ne intencas reaboni, ni petas sendi al ni poŝtkarton nur kun nomo kaj adreso, sed kun trakrucita dorsoflanko de la poŝtkarto, aŭ kun grandeta kruco sur ĝi (ankaŭ tiam oni povas afranki presaje).

Provizore ni liveros al ĉiu eŭropa aboninto por 1946, kiu ne malabonis, ankoraŭ la januarajn numerojn, al ĉiu aboninto en Norda Ameriko kaj Afriko krome la februarajn kaj al ĉiu aboninto en la cetera mondo ankoraŭ la martaajn numerojn, atendante ke tiuj, kiuj tamen ne volos daŭrigi la abonon dum 1947, pagos la troajn numerojn per respond-kuponoj (po 2 kuponoj por unu numero).

Italoj atentu! En la tabelo, publikigita en n-ro 7, la abonkotizo por Italujo estis erare indikita je 300 liroj. Tamen ni decidis ke tiu ĉi kotizo restu validanta por ĉiuj, kiuj estas pagintaj ĝis la fino de januaro. Sed poste validos la kotizo indikita en la hodiaŭa numero (450 liroj).

Al Germanujo Heroldo ankoraŭ ne estas liverbla; sed ni esperas ke tio baldaŭ ŝanĝiĝos.

PAROLAS LA LEGANTO.

ESPERANTISTA SALUTGESTO.

En Heroldo n-ro 6 proponas nia malnova s-ano R. Robertson apartan salutgeston, kiu identigu nin esperantistojn kaj eventuale servu kiel propagandilo. Al mi ŝajnas la afero superflua, ĉar lia s-ano A., kiu be- daŭrinde ne portas la verdan stelon, certe havas kaŭzon por tio (li hontas porti ĝin, aŭ liaj superuloj ne volonte vidas ĝin ktp.) kaj verŝajne la sama kaŭzo ĝigos lin ne saluti laŭ esperantista maniero. Cetere la senstela s-ano A., renkontante la nekona- tan verdstelon B., ne devas atendi, ke tiu alparolu lin sed, salutante la fremdun- lon per ĉapelleva aŭ kapklino, povas mem « tuj kapti la okazon konatigi ». Ne forge- su, ke la mangesto proponita iom similas al la salutgesto de la skoltoj, kaj supraja observanto opinios vidi du homojn el la vicoj de ni skoltoj, aŭ eble konsideros s-anojn A. kaj B. anoj de iu faŝista sekcio.

Prefere ni portu ĉiuj la verdan stelon. Oni klopodu fabriki plaĉajn, pli malgran- dajn insignojn, kiujn oni volonte surbrus- tigos. Ne miru, se la pugnogradajn insig- nojn ne ĉiu ŝatas porti. Sed se ne nur la fervora s-ano B. sed senescepte ni ĉiuj havos sur la brusto nian verdan stelon, tiam ĝi fariĝos « salonkapabla » kaj an- kaŭ s-ano A. ne devos honti alpingli ĝin sur sian veston. Tiam ni facile rekonos ĝis tiam neviditajn samideanojn, kaj la preterpasantoj estos ĉiam atentigataj pri Esperanto.

En skolta kanto, kiun ni lernis de niaj hungaraj gefratoj dum la ĵamboreo en Gö- ddöllö, oni kantas :

« Kiu hontas porti la verdstelon,
Tiu kaŝu, tiu kaŝu sin en la malhelon ! »

SKOLTOFRATO EL ĈEĤOSLOVAKUJO.

LIMOJ FORIGINDAJ.

Precipe nun ni speras la malfacilaĵojn de la artefaritaj limoj. Se vi deziras viziti eks- terlandan amikon, aŭ se vi deziras sendi ion al li, vi renkontas la barojn, kiuj male- bligas la tutmondan interrilaton. Kial tiuj bariloj ? Ĉu ni ne estas la samaj homoj kiel tiuj, kiuj hazarde naskiĝis translime ?

Ke oni amas sian naskiĝlokon estas kom- preneble, sed tio estas io tute alia ol la ŝovinismo kiun ni renkontas en la mondo. Ŝovinismo estas la opinio, ke ni estas pli bonaj, pli heroaj ol la homoj, kiuj ne loĝas inter niaj landlimoj. Dum kvin jaroj la mondo rikoltis la fruĵojn de tiu malsano, de tio kiomero. La nacisocialismo sufiĉe pru- vis pri tio.

Estas dezirinde, ke la homaro ekkompre- nu la neceson starigi mondordon. Koncer- ne la evoluon de l' ekonomio la diversaj na- ciformoj fariĝis superfluaĵ, eĉ antikvaj. La homaro nepre devas ekkompreni, ke nur kunlaborado povas savi la mondon. Estas kompreneble, ke por efektiviĝi tutmondan kunlaboron oni devas akcepti kaj aplikadi la antaŭkondiĉon : Esperanton. Tamen, se ni kiel esperantistoj konvinkiĝis pri tio, ni ankaŭ devos kompreni, ke necesas montri esperantistan unuecon al la homaro.

La neesperantistaro ne interesiĝas pri SAT, IEL, UEA aŭ pri kiu ajn. Antaŭ tiuj homoj devos aperi unu verda fronto. Kiel esperantistoj, ni volas forigi la lingvajn ba- rojn, sed ni forgesas forigi la limojn, kiuj apartigas la esperantistojn. Ĉu ne eblos ali- gi tion ? Jes, se ni nur volos kaj agos.

ADRIANO.

KONTRAŬ LA KONSKRIPCIO.

En Britujo dum la milito, kiel en aliaj landoj, oni forte batalis kontraŭ la militis- mo, kaj kontraŭ la interrasa malamo.

Politikuloj milope rifuzis partopreni la militon, sciante ke ĉiam la populanoj bata- las kontraŭ la popolanoj, vane por si ; ho- mamantoj milope rifuzis preni pafilojn, di- rekti aviadilojn kaj bomb-aeroplanojn kon- traŭ siaj homaj gefratoj ; logikuloj dete- nis sin de milithelpo, sciante ke nenion la milito solvos krom la demando kiu plej sovaĝe batalas. Milope tiuj homoj estis enkarcerigitaj, persekutitaj kaj metitaj al laboro je malaltaj salajroj aŭ longe for de siaj familianoj.

Ĉion tion ili faris, kredeble, por ke ili ne ĵetu bombojn sur vin, samideano.

Kaj nun, post la milito, iuj homoj volas enkonduki en la socion de nia lando sis- temon de daŭranta konkskripcio. En ĉiuj grandaj urboj starigis komitatoj por agiti kontraŭ tio. En centoj da urboj formuloj de « Peticio » (petskribo) rondiras kaj estas prezentotaj al la parlamentanoj, petante ke ili forigu la nunajn leĝojn por militservado.

Oni starigas en la publikaj placoj kaj de- klamas kontraŭ la leĝoj al la homamasoj. Mi prezidis en centra placo de malgranda urbo, kaj centope la homoj aŭskultis, aplau- de aŭ argumente, eksoldatoj portis la for- mulojn inter la aŭskultantojn, kolektante subskribojn, aŭfisegoj anoncis : « For la kon- skripcio ! »

Multloke la homoj ne atentis la agita- don. Aliloke ĝi faras nur malgrandan efik- kon. Generale ĝi ne atingas homojn kiuj plej bezonas nian mesaĝon, ne pro tio ke ili ne aŭdas sed pro tio ke ili havas fortan kontraŭargumenton. Ili diras : « Sed kiel ni povos defendi nin kontraŭ la fremdaj armeoj ? »

Tial mi demandas al vi, fremda sami- deano, kiel ni povos defendi nin kontraŭ vi ? Ĉu ni devos ? Ĉu vi intencas invadi nian landon ? Ĉu vi intencas malboni kon- traŭ nia ekonomio ?

Se jes, bonvole sciĝu al ni kial, kaj ni penos bonigi la malbonon kio kaŭzas tiun deziron de vi.

Se ne, bonvole skribu al ni pri tio, por ke ni konvinku niajn samlandanojn, ke iliaj timoj estas naskitaj en si kaj ne ha- vas fundamenton en la realeco.

Persone mi estas certa, ke neniu mino- cos Anglujon, se la anglaj ne (ŝajne aŭ ve- re) minacos antaŭe. Do, kial la homoj en ĉi tiu lando timas eblajn minacojn de ekstere ? Ĉu vi havas tiajn intencojn kon- traŭ ni ? Se jes, kial ? Mi vere kaj honeste deziras tion scii.

V. VERDA.

Ni recenzas.

Bazoplano pri la rekonstruado de la Ro- terdama Centro. Formato ĉ 40 x 29 cm, bo- na papero, plurkolora presio ; la sama ĉ. 31 x 24 cm, simpla papero, dukolora presio. Aldonita estas *Klarigo* pri la Bazoplano. Krome 4 bildoj sur formato 32 x 47,5 cm : *Roterdamo, kia ĝi estis, estas, sed kia ĝi fariĝos.* — Roterdamo estas tiu nederlanda urbo, kiu plej multe suferis pro la milito. La 14.5.1940 venis la germanaj aeroplanoj, sisteme bombardis la dense konstruitan ur- bon, kaj kelkajn horojn poste la vesta cen- tro kun loĝejoj, preĝejoj, teatroj, magaze- noj, kafejoj ktp. ne plu ekzistis. Sed la Roterdamaoj ne senkuragiĝis. Ili rekon- struos sian urbon laŭ novaj, modernaj principoj. — Mankas indikoj pri la eldona- ro. Supozeble la eldoninto estas la urbo Ro- terdamo mem. Nin atingis la presaĵoj pere de FLE en Amsterdam. Ni aldonu ankoraŭ ke la presaĵoj estas en du lingvoj : neder- landa kaj Esperanto.

La uzado kaj la instruado de la interna- cia lingvo. Prelego de Jozefo Joels, farita la 21.6.1946 en la Esperanto-Klubo ĉe la Kristana Asocio de Junuloj de Rio de Janeiro, Brazilo, str. Araujo Porto Alegre 36. — Multoblita, tre (ĉu ne tro ?) akra kri- tiko kontraŭ labormetodoj de kelkaj sami- deanoj ne laŭnome menciiataj.

Esperanto je servo de scienco.

Pri retroa migro de apusoj, t.e. migroflu- go de certa speco de hirundoj en direkto kontraŭa al la kutima, aperis en ornitolo- gia gazeto «Ardea» 1946, 1-3, artikolo de s-ano ornitologo G. F. Makkink, kun es- perantlingva resumo. La artikolo aperis ankaŭ kiel aparta presaĵo. Samfakuloj, kiuj interesiĝas pri la temo, sin turnu al la redakcio de «Ardea», Rijksmuseum voor Natuurlijke Historie, Leiden, Nederlando.

Gazetoj pri Esperanto.

Libre Artois, Arras, 10.10. Enhavis deta- lan artikolon pri la publika voĉdono fran- ca koncerne Esperanton.

Nederlands Talentblad, Leiden, 8-a jaro n-ro 3. Kun artikolo de M. de Waard pri la Esp.-ekzamenoj en Nederlando.

De Tempelier, Utrecht, 31.8., 14.9, 12. kaj 26.10., 9. kaj 23.11. Enhavas Esp.-guron je daŭrigoj.

Blauwe Schakels, Rotterdam aŭg. Kun art. : Van Lingwe Universala tot Lingvo Internacia.

Bellamy Nieuws, Haarlem, 13.8. Enhavis artikolon pri la Int. Asocio Bellamy (espe- rantista), adreso : Torenstr. 26, Beverwijk, Nederlando.

EKZAMENU VIN MEM !


Respondoj

al la demandoj en la pasinta numero.

- 27. S-ro Arne estas figuro en la rakonto de Selma Lagerlöf «La mono de Sin- joro Arne» (trad. Engholm). — «Sin- joro Tadeo» estas fama pola epopeo de Mickiewicz (trad. Grabowski). — «Paŭlo Debenham» estas originala Es- peranto-romano de H.A. Luyken ; Mr. Tot estas ĉefpersono en originala ro- mano de Jean Forge («Mr. Tot aĉetas mil okulojn»).
- 28. Malgraŭ la nubokovrita ĉielo Mario eliris por sia kutima matena promena- do. Sia ruĝa ŝalo gaje flirtis en la ven- to. Sian ombrelon ŝi tenis en la deks- tra mano. En la parko ŝi renkontis sian kolegon Paŭlo. Lian altan staturon ŝi ekkonis jam de malproksime. Ankaŭ li estis promenanta, lia mieno estis sere- na, kaj kun sia kutima afabla rideto li aspektis tre bone. Post kora inter- salutigo, ili (ĉar ilia celo estis la sama) kune daŭrigis sian promenadon.
- 29. a) Mondlingva projekto de la araba ŝejko Muh-Eddin (16-a jarcento) ; b) Kataluna Esperantista Federacio ; c) Esperanto-alfaro de germana stenogra- fia miks-sistemo (el Gabelsberger kaj Stojze-Schrey) ; d) verketo de Kaloc- say.

Novaj demandoj kaj taskoj.

- 30. a) Kiu serio de Esperantaj libr(et)oj atingis la plej multajn numerojn, kaj kiom ? — b) Kiu Esperanto-gazeto atingis la plej multajn numerojn, kaj kiom ?
- 31. Kie aperis la plej multaj Esperanto-li- broj dum la lastpasinta milito ?
- 32. Legante la kompostprovojn por la ho- diaŭna numero de Heroldo, ni trovis la jenan eraron : Fataj kunsidoj, ansta- taŭ : Pakaj kunsidoj. — Korekту la preserarajn en la jenaj frazoj : a) La ebrulo tiom ŝatis sian edzinon, ke ŝi forkuris de li ; b) Mario manĝis ho- mojn kaj projojn kun egala apetito ; c) Legante la teruran informon, la fran- co poligis.



Esperanta Radio-Kalendaro.

Koncerne la Esperanto-radio-disaŭdigojn vidu la horojn, staciojn kaj ondlongojn en nia numero 8, de 15 novembro. Pri la horo de la *Varsoviaj disaŭdigoj* (ĉiulunde vespe- re) ni ricevis tri diversajn indikojn : 20.30, 21.00 kaj 21.10 GMT, sed la ĝusta horo ver- ŝajne estas 20.30.

La 20.12. 18.45-19.00 GMT (19.45-20.00 nederlanda tempo), ondo 415 m., parolos R. v. Sprosen el la Radio *Hilversum* en la rubri- ko «La Evangelio per Esperanto».

Oni daŭre alvoku la *Hungaran Radion*, Budapeŝto, precipe el najbaraj landoj, ke ĝi donu en Esperanto prelegojn kaj anon- con de muziknumeroj por eksterlandoj. «La frosto jam komencas degeli.»

ENIGMO-KONKURSO

N-ro 8

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
a									
b									
c									
d									
e									
f									
g									
h									
i									

LABIRINT-ENIGMO.

La vortoj komenciĝas kaj finiĝas ĉe dika linio. La litero «r» inter krampoj (r) signi- fikas ke oni devas preni nur la radikon de la koncerna vorto. Jen la signifo de la serĉo- taj vortoj :

Horizontale (de maldekstre dekstren) :
a 1. Urbo konata por grava historia proce- so (Esperanta formo) ; b 2. nomo de pluraj papoj ; b 6. multe ; c 1. kondiĉa for- mo ; c 4. prepozicio ; c 8. sekve ; d 2. ar- bofrukto (r) ; d 6. dokumento (aŭ parto de teatraĵo) (r) ; e 1. difinita aro da viroj ĉe la institucio sub i 1 ; f 2. aktora tasko (r) ; f 6. vojo flankata de arboj (r) ; g 1. tre ofta konjunktio ; g 4. amfibia besto (r) ; g 8. interjekcio ; h 2. lirika poemo ; h 6. mallongigo por konata organizaĵo ; i 1. in- stitucio instalata en la urbo sub a 1.

Vertikale (de supre malsupren) :
1 b. Unu el la tri ĉefaj frazelementoj (r) ; 2 a. sufikso ; 2 d. senmakula (r) ; 2 h. va- lora metalo (r) ; 3 b. inklino ; 3 f. troviĝas sur akvo kaj en aero (r) ; 4 a. muzika ter- mino (r) ; 4 d. nombro ; 4 g. vestaĵo (r) ; 5 a. itala havenurbo ; 5 f. birdo (r) ; 6 a. malgranda ; 6 d. partico (kun adjektiva finaĵo) ; 6 g. en tiu ĉi momento ; 7 b. ŝto- negro (r) ; 7 f. astro (r) ; 8 a. prefikso ; 8 d. kiel b 6 ; 8 h. konjunktio uzata ĉe kom- paracio ; 9 b. solrajto de fabrikado aŭ de vendado (r).

KAS-ENIGMO.

En ĉiu el la sekvantaj frazoj estas kaŝita la nomo (radiko) de iu gento. La komenc- literoj de la gentnomoj, ĝuste ordigitaj, in- dikas faradon (sen la finaĵo -o), kiu estas necesa por nia vivo ; kiam ni ĉesos ĝin fari, ni mortos. Jen la frazoj :

Tiu ĉi presejo ne posedas la Esperantajn supersignojn.
La novaj grupanoj fiere portis surbruste la verdan stelon.
La vundito estis portita en hospitalon.
Plorante kaj pliedante, la mizerulino ete- ndis sian manon por peti almozon.
Rapide moviĝis la anserbekoj.
La publiko amase staris laŭstrate por vidi la faman scienciston.

Por la ĝusta solvo de la hodiaŭaj enigmoj ni fiksis la jenajn libropremiojn :

- 1. Sveda Antologio, 2-a vol., bindita.
 - 2. Tolstoj : La morto de Danton.
 - 3. Privat : Tra l' silento.
- Solvaj alvenu ĝis la 22-a de januaro 1947 al la redakcio de Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Neder- lando. Skribu la solvojn sur poŝtkarto aŭ sur aparta papero.

SOLVOJ

de la Enigmo-Konkurso N-ro 6.
SILAB-ENIGMO.

Panorama (aŭ : panoplio) akvofalo, ci- tronujo (aŭ : citronarbo), kronometro, oratoro, nepotismo, grafologo, retoriko, emocio, Salomono, ovacio. — Pakkongreso.

NOM-ENIGMO.

Radioparolisto, urbestro, brutbredisto lokomotivestro, orgenisto. — Rublo.

Alvenis 32 solvoj el 9 landoj, el kiuj estis korektaj 30 solvoj el 8 landoj. Pri la dis- dono de la premio decidis la loto jene :
1. Prof. D-ro H.Sirk, Wien, Aŭstrio.
2. H.Hasper, Haulerwijk, Nederlando.
3. Froger, L'Hôpital-Ydes, Francujo.

RIDO SANIGAS

ESPERANTISTO AL ALIA :
NOBELA FAMILIO.

— Teofilo estas fanfaronulo. Li asertas ke li devenas de nobela familio.
— Efektive, liaj parencoj estas dukoj kaj grafoj.
— Kiel do ?
— Lia avo estas eĉ tre ka-duka. Li mem naskiĝis en Domo Dukverkoj («Du kver- koj») kaj havas tradukan profesion. Lia patro estis geografo, unu el liaj onkloj estas litografo, kaj alia estas fotografo. Estas la gepatroj de lia edzino havis eĉ pap-avon ... en la ĝardeno.

BLUFO.

Fruktarbejestro nederlanda akceptis ame- rikanon ege fanfaronantan pri la mirigaj kreskaĵoj produktataj en la Nova Mondo. La fruktulturisto decidis instrui la ameri- kanon, kiu daŭre blufadis pri « la plej gran- da tio » kaj « la plej granda ĉi tio », ke « kiu nenion valoras, plej multe sin glo- ras ». Irinte en la ĝardenon, li prenas me- lonon, dirante : « Ĉu ankaŭ en Ameriko ekzistas tiaj pomoj ? » « Ĉu pomoj ? » sur- prizite respondis la amerlikano. « Kuraĝu vi, nomi ĝin pomo ! Ĝi estas ribo ! »

VIVSORTO.

— Nu, kiel fartas ambaŭ viaj filoj ?
Sinjorino Kiaĉam : La malpli juna ed- zigis, sed la juna fartas bonege.

Valora donaco

por ĉiu esperantisto estas la oficialaj Esperanto-poŝtmarkoj

eldonitaj de la Brazila Poŝto. Ni sukcesis, havigi al ni limigitan kvanton de tri bra- zilaj Esperanto-poŝtmarkoj, nome de tiu el- donita okaze de la Ora Jubileo de Espe- ranto kaj tiuj eldonitaj okaze de la Deka Brazilia Kongreso de Esperanto (unu kun la portreto de D-ro Zamenhof). Ni vendas ilin kune por gld. 1.25 aŭ por 6 respon- d- kuponoj (inkl. leterafranko). Se oni sam- tempe mendas librojn, la tri poŝtmarkoj kostas gld. 1.— Nur antaŭpage.

LIBROJ EL BRAZILLO.

Fine ni ricevis ankaŭ importpermeson por la jenaj libroj el Brazilo (sed nur por 5-20 ekz.), kiuj do nun estas haveblaj :

Al la Deka Brazilia Kongreso de Es- peranto	0.50
Bhagavad-Gitā	1.10
La sama, bindita	1.40
Diverskolora Bukedeto	1.25
La sama, bindita	1.85
Enkonduko en la studadon de la spi- ritisma doktrino	0.80
Esperanto-Modelo	1.70
La libro de la spiritoj	6.20
La sama, bindita	7.40
La vidvinto, romano	1.10
Monumento de C. Bourlet	1.10
Preĝlibro por spiritistoj	0.50
La sama, bindita	0.80
Tipoj kaj aspektoj de Brazilo, bind.	6.20
Veterano	1.10
La sama bindita	1.70
Voĉoj de poetoj el la spirita mondo	1.40
La sama, bindita	2.—

Por sendkostoj aldonu 10 %, sed minimume gld. 0.15. Ĉe mendoj super gld. 5.— ni ne kalkulas sendkostojn.

Libro-Servo de Heroldo de Esperanto, Scheveningen

ANONCETOJ

Reprezentado de eksport- kaj import- firmoj serĉas kun bonegaj interrilatoj inter la aĉetantaj firmoj de Urugvajo Alfredo Klein, Fabriko de trikotajoj, Calle Uruguay 795, Montevideo, Urugvajo. (13)

Korespondadon per ilustritaj poŝtkartoj deziras s-ro Iver Svarstad, P.O. Box 1909, Long Beach, California, Usono. (15)

Naskiĝo Sturmer. Al ges-anoj K.R.C. Sturmer en Elm Park, Essex, Anglujo, la 19.11. naskiĝis filo Edward Achille, frato por Raymond. — Koran gratulon !

Bildkartan kaj Letervesperon aranĝos la Nieuwpoort'a Grupo Esperantista, la 29-an de januaro 1947. Gesamideanoj el proksim- aj kaj malproksimaj landoj estas petataj, sendi kiel eble plej baldaŭ poŝtkartojn kaj leterojn por sukcesiĝi niajn klopodojn. Skribu al s-ro Leon Braet, del. de IEL, Bulvarado Willem Deroo 10, Nieuwpoort, Belgujo.

Letervespro okazos en Herning Esperanto -Klubo en la fino de januaro. Mankas al ni korespondado por la novaj gelernantoj. Ni atendas multajn kartojn kaj leterojn. Marku la kovertojn : «Letervespro». Tut- certa respondo. Adreso : S-ro Th. Andera- sen, Smedegade 2, Herning, Danlando.

Kvar samideanoj deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Certe respon- das. Skribu al Josef Pácal, komercisto, Brusnice u Trutnova, Ĉeĥoslovakujo.

Ses francaj lernantinoj (15-20-jaraj) desi- ras tutmonde korespondi. Skribu poŝtkarte al s-ro Ponson, 48 rue Dugesclin, Fougè- res (Ille et Villaine), Francujo.

Al ĉiu, kiu sendos al mi karton pri vent- muelilo mi sendos ankaŭ tian karton. E.v. Walsum, del. de IEL, Pp-Smitstraat 68, Alblusserdam, Z.H., Nederlando.

S-anoj J. Jelen, V. Gaspar, Fr. Jozsa, mal- novaj amikoj, maristoj, skribu al Ralph R. Bonesper Apt. 5 D, 461 West, 44th Street, New York 18, N.Y., Usono. Legantoj, kiuj konas ilin, bonvolu atentigi ilin.

Kun malnovaj kaj novaj samideanoj en la tuta mondo mi ŝatus korespondadi. D-ro Lukács Gyula, Financedirekcio, Szeged, Hun- garujo.

Korespondantojn-filatelistojn serĉas s-ro Reinhold Lehmann, Turnerweg 3, I., Dres- den N. 6 Germanujo. Ankaŭ korespondan- toj pri ĉiaj temoj serĉataj por lokaj es- perantistoj.

Nova grupo geinstuista el gimnazia, po- pola kaj komerca lernejoj deziras korespon- di kun kolegoj tutmonde. Skribu unue al : Instruista Grupo, Poŝtfako 16, Škövde, Sve- dujo.

Deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo pri ĉiuj temoj. 23-jara horlo- ĝisto. S-ro Frede Buskbjerg, Kibaek, Dan- lando.

Deziras interŝangi poŝtmarkojn kun fila- telistoj de ĉiuj landoj kaj korespondi pri studentaj problemoj. N. Golner, Crvene Ar- mije 8, Zagreb, Jugoslavio.

Al kursanoj en Glinde mankas lernolibroj kaj literaturo. Por havi provizoran legaĵon, ili deziras ricevi leterojn el eksterlando. Bonvolu adresi al : Esperanto-kurso, s-ro B. Gahler, bei Koch, Sandkamp 22, Glinde bei Hamburg-Bergedorf, Germanujo.

Esperantisto el la jaro 1922, kiu multe korespondatis antaŭ la milito per ilustra- taj poŝtkartoj kaj leteroj, nun denove desi- ras korespondadon ; ankaŭ por miaj ge- kursanoj en du vilaĝoj mi serĉas korespon- dantojn. S-ro H. Fick, (3) Neu-Wokern, Mecklenburg, Germanujo.

La Internacia Katolika Informejo, sekre- tario : Fr. M. Monulfus, Loonopzand, Ne- derlando, senpage donas informojn pri la katolika religio al nekatolikoj. (4)